



# *The* NORTH AMERICAN ESPERANTO REVIEW

Vol. 2 No. 5

Official Organ of the Esperanto League for North America

Sept.-Oct., 1954

## "MUCH HAS BEEN ACCOMPLISHED"

By Willem Drees

*The following is a translation of the remarks of Willem Drees, Prime Minister of the Netherlands, as he opened the 39th Universal Congress of Esperanto in Haarlem. The speech was made in Esperanto by Mr. Drees.*

Mr. President, ladies and gentlemen:

It is a pleasure for me to say a few words of welcome to you, the participants to this Congress. Of course, we are always happy when an important international organization takes notice of our country and decides to hold its annual convention here. We are especially happy, when the number of participants is so large as is the case here. That proves that our country, though small, does have some charms for Congress visitors.

We cannot offer you a variety of highlands and lowlands, of mountains and valleys. Our country is part of the Lowlands of the Sea, and except for our dunes and—in the South—some rather hilly terrain, you will not find much more than flat country, particularly pasture and farm land. Forests and other places of rest and relaxation exist only in small scale. The Netherlands is the most densely populated country in the world and we must fully utilize our territory. Our country is cultivated, in the sense in which a garden is cultivated. In addition it has one special characteristic: to a great extent it has been won from the sea, which is our friend and our enemy. Approximately one-half of our country lies beneath the level of the sea and must be protected from the sea. Sometimes we do not succeed in this, as happened, for example, on February 1, 1953. when the

southwest part of our country was inundated. That catastrophe so shook the world, that abundant aid came from all sides, showing that human sympathy and international solidarity, even in these difficult times, are not empty words.

Happily the Dutch people did not allow themselves to become discouraged. With increased vigor, they took up once again the battle for earth and security. New plans have been formulated; plans by which we hope to secure the islands of the provinces of Zeeland and South Holland. If there are any among you who will visit our work at the South Sea, they will see how, by what means, and in what scope our people still know how to gain land from water.

I am sure that in our towns and villages, as well as our museums, you will see much to interest you. You will find evidences of a glorious past, but you will also realize that this past is not the only basis of Dutch life.

During the war our country was greatly damaged and it suffered grave losses, but everywhere one can see how much work is being dedicated to reconstruction, and how well the reconstruction is progressing.

Moreover, I believe that our country can offer you, as Congress members, something for the spirit. We have always been open to cultural influences of all kinds. As a small people with intensive traffic across our borders and across the seas with the whole world, we are very internationally oriented. In spite of that, we have not lost our national character.

You will find here an appreciation of the need for close contact among

the peoples of the world; this means an appreciation, too, for your aim of facilitating that contact through the solution of the language problem.

Your Congress is different in character from other international meetings. At other congresses, definite subjects are taken up, which interest the participants from the various countries. But there the diversity of language forms a barrier against fluent, succinct deliberations and often creates an inequality among the participants, of whom some are allowed to speak in their native languages and others are not; and of whom some are not able to understand all that is said. In such cases language is a factor which brings about an undesirable division and is a source of difficulty.

In your case, on the other hand, the language problem is itself the subject; and the language which you all speak, which is a native language for no one of you, a language with respect to which you all stand equally, an acquired language yet a most versatile one—that language is what binds you together.

In my introduction to the Congress book I have already expressed my respect for your cause and my sympathy for the international language, Esperanto. I want to be careful to add, however, that in a practical sense I can not be numbered among the active followers of your movement. I have looked into Esperanto to some degree, and have experienced how simple a language it is and how easy it is to learn and read it; but the demands of my work have not permitted me to find opportunities for

(Continued on page 12)

Published bi-monthly by the ESPERANTO LEAGUE FOR NORTH AMERICA, INC., as its official organ. Subscription free to members. Subscription for non-members: \$1.75 per year. Other rates: Bulk orders of 15 or 30 copies of any issue may be ordered, in advance, by members, for 60c and \$1.00 respectively; gift subscriptions for schools, libraries, eminent persons, etc., and for Esperantists living in countries outside of North America, may be purchased by members for 30c per year. (The Review reserves the right to refuse gift subscriptions for persons who should pay the higher rate.)

**Addresses:** Subscriptions and bulk orders should be sent, with payment, to the Treasurer. Correspondence regarding circulation, including changes of address, etc., should be sent to the League Secretary. Send literary contributions, news items, announcements, etc. to the Editor: David B. Richardson, 6205 So. Prospect, Tacoma 9, Wash.

**Deadlines:** The Review is placed in the mails about the fifteenth of every second month. Material for publication must be in the hands of the editor no later than the 15th of the preceding month, except for last-minute news items, which will be accepted as late as possible.

THE ESPERANTO LEAGUE FOR NORTH AMERICA, INC., is a non-profit organization to encourage the use of the International Language, Esperanto. **President:** John L. Lewine, 52 Riverside Drive, New York 24, N. Y.; **Vice-President:** James D. Sayers, RFD 2, Lillie, La.; **Secretary:** Conrad Fisher, RFD 1, Meadville, Pa.; **Treasurer:** Edward W. Pharo, Jr., "Nur," County Line Rd. and Simms, Somerton 16, Pa.; **Chairman, Executive Board:** F. R. Carlson, 2116 N. 35th St., Seattle 3, Wash.

**Membership Dues:** Regular Member, \$3; Supporting Member, \$5; Patron, \$10; Life Member, \$50; Man and wife, each having privileges of Regular Member but receiving only one copy of publications, etc., \$4.

Make checks and money orders payable to "Esperanto League for North America, Inc."

Members are asked to take careful note of the paragraph above entitled "Addresses" and to address all communications accordingly.

## RULINGS BY THE PRESIDENT

1. Declared the office of General Secretary vacant, due to resignation of S-ano Dormont.

2. Declared a vacancy on the Executive Board, due to death of S-ano Bovit.

## EXECUTIVE BOARD DECISIONS

Appointed S-ano Conrad Fisher to serve as General Secretary until the 1955 election.

All officers and members are requested to send requests or suggestions for the 1954-55 ELNA budget to Gilbert Nickel, 204 Harding Ave., Silview 4, Del.

## NI BEDAURE ANONCAS

ke la amerika Esperanto-movado perdis unu el siaj plej eminentaj gvidantoj. Jela 28a de aŭgusto S-ano Ernest Dodge, filozofa, verkisto, aktivulo por Esperanto, mortis en la aĝo de 84 jaroj. Eble la plej bone konataj el liaj verkoj estas "Flugado Alimonden" kaj la angle verkita "Bold Thoughts On Life". Lia korpo mortis. Liaj faroj vivas.



Ernest G. Dodge

En Germanujo estas grupo, kiu volas atingi la familiojn Esperantistajn. Ĝi eldonas revuetojn *Bulteno Gepatra*. Skribu al la estro: D-ro A. Paul, TUTTLINGEN, Möhringer Str. 70.

En 1953 kaj 1954 oni eldonas grandan tutesperantan kalendaron por muroj, kaj sendas al la grupanoj kun la bulteno.

## Konstante portu la verdan stelon

I had just purchased a new suit of clothes and was looking forward to wearing them in Church for the first time. My wife saw that I was about to pin my Esperanto star on the coat, and urged me not to wear it on my brand new suit. Still it has been my habit for many years to wear the green star, no matter where I go, and so I wore it to Church.

Now I am not as young as I once was and in order to hear well I have to sit in the front pew. And when the pastor of our Church introduced the guest speaker, who was a missionary just home from Japan, I was surprised to hear his first words: "I see in front of me some one wearing the green star of Esperanto." Then he looked right at me and asked: "Cu vi estas Esperantisto?"

At first I was quite surprised; then I nodded my head, "yes," and he went on: "I will give your pastor the address of a Japanese friend of mine, who is an Esperantist, and who is sick in a Japanese hospital; perhaps you will be kind enough to write to him."

Of course the rest of the congregation was even more surprised than I, and after the Service many of them came to me and asked about Esperanto.

*Karaj gesamideanoj!* Whether your suit is new or old, be proud of the green star! Wear it always!

E. Peck



LARRY REYNOLDS  
LOOK

"Ho, mi estos preta ĝustatempe. Mi bezonas nur bani, razi, kaj vesti min."

# ESPERANTO IN NORTH AMERICA

News-notes from around the United States and Canada

## Los Angeles

Disc Jockey Ben Hunter of radio station KFI read a letter from our good member Adrian Hughes on his night owl program, "The Other Side of the Day" on Sept. 7. He then asked for "anyone who can talk Esperanto to call in and say something in the language." Apparently no Esperanto-speakers were tuned-in at 1:25 in the morning, but several calls were received from persons who were interested or associated with the movement in some way. The following morning, Donald E. Parrish was hooked onto the air by telephone and was invited to talk in and about the international language, which he did at some length.

On Sept. 14, announcer Hunter mentioned Esperanto again, stating that considerable mail had been received in which interest was expressed.

## San Francisco

The Aug. 20 meeting of the San Francisco group was host to two welcome visitors: Arthur Todd, of San Diego, and Prof. C. Adcock of Wellington, New Zealand. The latter arrived in California on a tour of American universities.

## "Esperanto in Bottles"

In the last *Review* we reprinted a cartoon by Danish cartoonist Bo Bojensen suggesting Esperanto in bottles "to loosen tongues." As a matter of fact, Esperanto has been in bottles for years, as part of a project of the U. S. Hydrographic Office to learn more about ocean tides and currents. Selected merchant marine officers are given special forms on which they fill in the date, name of ship and exact location. Then the data is sealed in a glass container and cast overboard. Although these bottled messengers contain detailed instructions in eight different languages, including Esperanto, few have been returned—possibly because many of them have yet to be found.

## Seattle

Seattle Post-Intelligencer columnist Jack Jarvis gave Esperanto a boost in the P.-I. for August 21 after a brief mention on August 16 produced a letter from Ferd Carlson, in which the case for Esperanto was presented very nicely.

The Seattle Esperanto Society elected Mrs. Duane Walter President, Mrs. August Larson Vice-President, Vincent Griffith Financial Secretary, and Duane Walter Corresponding Secretary at the club's annual election. At the next meeting, Oct. 20, Mrs. Larson, who has just returned from a European tour, will report on the Haarlem Congress.

## ILEI

The *Internacia Ligo de Esperantistoj Instruistoj* is compiling a list of Esperantist teachers in North America. Send names and addresses to the American representative of ILEI, P. L. Hanson, Raleigh, North Dakota.

## Letter Contest Winner

The contest for letters to the State Department regarding the United States' position on Esperanto at the UNESCO discussions to be held in Montevideo starting in November was won by Adrian Hughes of Hillsboro, Oregon.



If the Esperanto activities in your area are not reported in the *Review*, it is not discrimination; we can't print news that isn't reported to us. Why not arrange, at your next group meeting, for some one member to take the responsibility for reporting local activities to the *Review*.

## Donations to the Review Fund

We wish to thank the following for their generous contributions: E. C. Pollock, \$5; W. G. Adams, \$5.


Ĉu vi konas Nederlandon?

Rigardu Nederlandon kun la fotografisto Ed. van Wijk kaj la ĵurnalisto Mr. E. Elias, kaj certe estos al vi granda ĝojo ekkoni ĝin – aŭ rekoni ĝin.

Van Wijk migris tra la lando kaj prenis siajn fotojn ĉie, kie li vidis ĉarman loketon, belan fasadon kaj karakterizan anguleton. Kaj li ne kontentiĝis per aleoj, fasadoj kaj arbogrupoj, sed li kaptis ankaŭ tiujn homojn, kiuj estas tipe nederlandaj kaj kiuj harmonias kun la dekor.

Mr. Elias ornamis ĉi tiun kolekton per agrablaj, poeziaj rakontoj pri grandaj kaj malgrandaj urboj, pri la trankvileco de la kamparo, pri la akvo kaj la floroj kaj pri la homoj. Li faris kernajn subskribojn por la bildoj.

Oni donos al la libro bonan lokon en la ŝranko kaj ne unu fojon, sed multajn fojojn elprenos ĝin. Romanon oni legas unu, du kaj eble tri fojojn. Poemon oni povas legi kaj ofte relegi. Sed bona bildlibro estas kamarado por la tuta vivo.



Prezo en Norda Ameriko: \$6.90, afr. Aktivaj Membroj de Universala Ligo rajtas aĉeti je favorprezo de \$6.20.

Mendu de:

Esperanto League Book Service  
Middleton, Wisconsin

### „Ekscita debato pro traduka eraro.”

Pri ekscita debato pro traduka eraro raportis Vienaj ĵurnaloj. Tiu debato okazis en unu el la kunsidoj de la Interparlamentara Unio (IPU) dum ĝia kongreso, kiu daŭris de la 31-a de aŭgusto ĝis la 3-a de septembro en la aŭstra ĉefurbo. Estis ĝia 43-a konferenco entute. Laŭ la raportoj oni tradukis nur en la anglan kaj francan lingvojn. Kompreneble, pro la lingvo de la kongreslando, oni parolis ankaŭ germane. Ekzistis ankaŭ la modernaj arangoj kun la konataj surorelaj aŭskultiloj, per kiuj oni do povis aŭdi francan aŭ anglan tradukon. La ŝtata prezidanto de Aŭstrujo D-ro h.c. Körner, la aŭstra federacia kanceliero ing. Raab, la ministro por eksteraj aferoj ing. D-ro h.c. Figl kaj la unua prezidanto de la aŭstra parlamento D-ro Hurdes (favoraj al nia Esperanto-afero) salutis la konferencon oficiale. Aŭstra parlamentano Berthold Stürghk estis elektita prezidanto de la konferenco.

Pri la kunsido okazinta la 31-an de aŭgusto ni legis i.a. jenon:

„En la posttagmeza kunsido antaŭ la daŭrigo de la debato pri malmarmado estiĝis ekscita, preskaŭ duhora debato pri la tagmeze okazinta voĉdonado pri la akcepto de ŝtatoj en Unon, resp. pri la (de la hungaraj prezentita kaj de la kunvenintaro akceptita) modifa propono, laŭ kiu la membroj de IPU intervenu ĉe siaj registaroj, ke ili rekomendu la petskribon je akcepto en Unon de tiuj ŝtatoj, kiuj jam prezentis tian petskribon.

La franclingva teksto esprimis: „de ŝtatoj petintaj” (kiuj jam petis), dum en la anglalingva teksto estis anstataŭ la pasinteco la estanteco, do: „la ŝtatoj petantaj” (kiuj petas). Post tio, reprezentantoj de la angla delegitaro postulis komence de la posttagmeza kunsido precizan interpretadon, resp. precizan tradukon de la franca teksto en la anglan lingvon, por ke ili sciu, pri kio estis voĉdonite. La reprezentantoj de la germana delegacio, antaŭ ĉio Prof. Carlo Schmid kaj Gerhard Luétkens, diris, ke oni voĉdonis pri la franclingva teksto, laŭ kiu la akcepto de Germanujo en Unon ne estus rekomendata. La aŭstraj parlamentanoj kaj aliaj delegitaj aliĝis al tiu opinio. Reprezentantoj de diversaj aliaj grupoj kaj ŝtatoj sin esprimis kontraŭ

tio. Aŭstraj, germanaj kaj svisaj parlantoj postulis la konstituadon de redakta komitato, ellaboradon de oficiala teksto en angla kaj franca lingvoj, nuligon de la tagmeze farita voĉdono kaj novan voĉdonadon. Post preskaŭ duhora daŭro la prezidanto, la aŭstra deputito Stürghk, konstatis, ke la debato pri tiu afero estas finita kaj ke morgaŭ estos voĉdonate pri la prezentitaj proponoj. Poste oni komencis la debaton pri malmarmado. . . .”

Jen faktoj pri internacia konferenco de parlamentanoj, konferenco laŭ moderna metodo kaj arango, kaj laŭ t.n. *dulingvismo angla-franca rilate al tradukado!* Kaj la traduk-eraro certe ne estas unuopa okazo ĉe tiaj internaciaj kunvenoj neesperantistaj. Ĝi bone ilustras la trafikajn vortojn, eldiritajn de la nederlanda ĉefministro Ekselenco D-ro Drees al la Universala Kongreso de Esperanto en Haarlem.

Ĉiukaze ni esperantistoj rekomendas al ĉiuj partoprenantoj de internaciaj kongresoj kaj konferencoj, ke ili iam *ĉestu niajn Esperanto-kongresojn*; ili venu, vidu kaj precipe *aŭdu*. Venu speciale kaj ĝuste la *skeptikuloj*, por travivi tian kongreson, kie *ne okazas traduk-eraroj, ĉar oni ja tute ne tradukas sed parolas senpere, sen dependeco de tradukisto, rekte en unu sola lingvo, en nia neŭtrala, internacia lingvo Esperanto.*

Sed la nomita fakto estas ankaŭ instruo kaj instigo por ni esperantistoj. Ni multe pli devus *eluzi* tiajn okazojn! Ni devus multe pli *enpenetri en neesperantistajn internaciajn organizojn kaj movadojn*. Ni devus tiurilate lerte kaj taktike *kunlabori* en la unuopaj landoj. Ni devus formi etajn grupojn, ankaŭ interligitajn unuopulojn *en* — interne de — aliaj internaciaj anaroj. La laboro por influo kaj enpenetro ekz. ĉe internaciaj arangoj, kia estis nun la IPU en Vieno, necesus seriozan preparon; eble ĝi, laŭokaze, estus pli valora kaj signifa por nia afero ol la arango de nura Esperanto-kongreso. Bedaŭrinde ni en Vieno nun ne povis uzi la okazon, niaj fortoj estis tro limigitaj. Tamen estonte nia Esperanto-movado ĝenerale devas konsideri kiel sian gravan taskon, enpenetri la aliajn internaciajn movadojn kaj instituciojn. Ni bezonas tiucele specialajn fakulojn el la koncerna fako, kiuj mem estas esperantistoj aŭ almenaŭ amikoj de Esperanto.

WALTER MUDRAK, Wien.

### Neatendita intereso por Esperanto ĉe belgaj instruistoj.

S-ro Maurice Vanderlinden, instruisto, Astene-Deinze, Belgujo, skribis al ni:

En Belgujo estas la kutimo, ke la geinstruistoj pritraktas skribe ian pedagogian temon, ĉiun jarkvaronon. Tiuj verkoj estas poste oficiale diskutataj en instruista rondo, prezidata de la ŝtata inspektoro por la popollerneja instruado. Unu el la temoj, kiujn la geinstruistoj devis pritrakti, estis jena: „Kiajn helpilojn vi uzas por kontaktigi viajn gelnantojn kun najbaraj, malproksimaj kaj fremdlandaj gelnantoj?” En tiu ĉi temo mi konkludis, ke internacia mondlingvo sin altrudis.

Car mi estis la sola instruisto, kiu skribis pri mondlingvo, la ŝtata inspektoro min invitis klarigi mian temon en la kunveno antaŭ pli ol 70 geinstruistoj. Mi skizis la devenon kaj disvastiĝon de la Esperanta movado kaj finiĝ per provleciono. Verdire la intereso estis granda, kaj la ĉeestantoj miris pri la laŭgeco kaj facileco de Esperanto. Multaj min petis gvidi kurson por geinstruistoj. Ankaŭ la ŝtata inspektoro interesiĝis tiom, ke li (mia estro) sin anoncis al mi (sia subulo) kiel ufua lernanto. Tiu ĉi fakto povus havi grandajn sekvojn por nia movado. Tial mi petas precipe al geinstruistoj, ke ili sendu esprimon de simpatio al: S-ro Inspektoro Raes, Driftweg 71, De Haan aan Zee, Belgio. Tiaj deklaroj konvinkos lin plue, kaj eble li povus interesiĝi siajn gekolegajn-inspektorojn. En tiu kazo nia movado farus grandan paŝon antaŭen por la enkonduko de Esperanto en belgajn lernejojn.

Rim. de red.: Estas utile, sendi al s-ro Vanderlinden (adreso supre) propagandan kaj ekspozician materialon el la tuta mondo, por aranĝi ekspozicion antaŭ la kurso. (Se necese, li resendos.)

### „Esperanto-Reĝino” — en São Paulo.

La kvar Esperanto-societoj de São Paulo en Brazilo organizis publikan konkurson por balotado de la „Rainha do Esperanto” en tiu urbejo. La konkurso vekis grandan intereson ankaŭ ĉe la neesperantista publiko. Ĝis la mezo de junio estis ricevitaj 6676 voĉoj por ses kandidatinoj. Pli ol duonon el la voĉoj (3464) ricevis f-ino Rosa Moreira Ló. La balotado daŭros ĝis la 1-a de novembro. La kronado de la „Reĝino” okazos la 18-an de decembro. Pri la konkurso detale raportis la urba ĵurnalo „Folha do Povo” en sia numero de 13.6., en kiu ĝi publikigis ankaŭ la fotojn de la kvar fraŭlinoj, kiuj ricevis ĝis tiu dato la plej multajn voĉojn.

### Naciaj lingvoj — nekomprenataj.

Laŭ „Notiziario Internazionale”, Torino, letero el Germanujo adresita al „Handelskammer, Lyon, Frankreich” (= Komercakambro, Lyon, Francujo) revenis al la skribinto kun rimarko: „Nekonata en Lyon”. Alian leteron, el Usono, adresitan al „The Manager, Lyon's Exhibition, Lyon, France” (= La direktoro, Liona Foiro, Lyon, Francujo) la franca poŝto liveris al la estro de la Liona Kazino, speco de varietea teatro, miskompreninte la vortojn „manager” kaj „exhibition”.

## La ĉefministro de Sudano estas esperantisto.

S-ano E. Nigmo, kiu vekis dum la U.K. en Harlema kaj poste dum la SAT-Kongreso en Nancio atenton pro sia „lad-azeno“ (aŭtomobilo), traveturis jam grandan parton de Afriko. Li skribis al ni el Khartoum, kie li havis kvaronhoran interparoladon kun la ĉefministro de Sudano, s-ro Ismail-el-Azhari. La ĉefministro lernis Esperanton antaŭ 24 jaroj kaj ankoraŭ favoras nian aferon. La ĝeneralan disvastigon de Esperanto en Sudano prizorgas s-roj Yousif Abuzeid Morgan (Saggana Postal Agency, Khartoum) kaj Willy C. Klein (P.O. Box 385, Khartoum). Multaj studentoj deziras lerni nian lingvon, sed mankas lernolibroj kaj vortaroj. Estas utile, ke samideanoj el la tuta mondo helpu la sudanajn esperantistojn, sendante anglajn kaj arabajn Esperanto-lernolibrojn kaj vortarojn al: El-dirdiri Ibrahim, University College, Khartoum, Sudano. S-ro Nigmo taksas, ke post du monatoj ekzistos en Sudano pli ol 200 fervoraj samideanoj. Post restado de 11 tagoj en Khartoum, s-ro Nigmo daŭrigis la veturadon tra Afriko per sia „ladazeno“ al Juba kaj Nairobi.



## En Dresden ankoraŭ ekzistas Zamenhof-strato.

Tion pruvas la supra bildo, kiun sendis al ni samideano vizitinta tiun urbon kaj trovinta la straton kun la nomtubulo „Zamenhofstrasse“. Do, ĝi transdaŭris la naziregimon kaj eĉ konserviĝis ĝis nun.

## Tricent samideanoj ĉe la 41-a Japana Esperanto-Kongreso.

La 41-a Japana Esperanto-Kongreso okazis la 5-an kaj 6-an de septembro en Tokio, en la aŭlo de Kyōikukaikan (Japana Eduka Societo) kun partopreno de ĉ. 300 esperantistoj. La kongreson prezidis Prof. H. Oka de Tokio Eduka Universitato.

En la sekcia kunveno de Unesko parolis s-ro Watanabe, vicsekciestro de Nacia Unesko-Komisiono, kaj s-ro S. Katamoto, membro de Nacia Unesko-Komisiono kaj ĉefdirektoro de Japana Federacio de Unesko-Asocioj.

## Ferio en Newbattle Abbey.

Pri la Esperantista Ferio en Newbattle Abbey, proksime de Edinburgo, kiu okazis en la lasta semajno de julio, ni ricevis jam frutempe detalan raporton de s-ino Marie C. Major. Sed pro manko de spaco (kaŭzita de la raportoj pri la Universala Kongreso) ni ne povis publikigi ĝin, kaj nun ĝi ne plu estas aktuala. Tamen jen ĝia komenca alineo:

Dum tiu ĉi semajno la skotaj esperantistoj (kaj aparte la membroj de la Edinburga Esperanto-Societo) montris sin kompetentaj organizantoj, gastamaj gesamideanoj, fervoraj propagandistoj kaj kulturamantoj. Nenion ili forgesis: ek de la aĉeto de vojaĝbiletoj Londono-Edinburgo por alilandanoj ĝis la provizo de speciala ĉambro, en kiu oni povis lavi, sekigi kaj gladi la vestojn, ili prizorgis la 60 partoprenantojn kiel karajn infanojn.

Partoprenis gesamideanoj el Belgujo, Danlando, Finnlando, Germanujo, Svedujo kaj Usono, krom la skotaj kaj angloj. Dum unu tago okazis agrabla festo en la liceo de Musselburgh, kie 180 gelnantoj estas studentaj nian lingvon, t.e. la duono de tiuj, kiuj venontjare eklernos franca. La alia duono ne lernas Esperanton. Poste oni faros komparon inter ambaŭ grupoj por konstati, ĉu la lernado de Esperanto helpas al posta studado de la franca lingvo. La vizitantoj konstatis, ke la infanoj post mallonga studado jam bone komprenis simplajn frazojn.

## 94,9 procentoj de la legantoj de grava ĵurnalo por Esperanto.

Nederlanda ĵurnalo „Het Parool“ publikigis antaŭ nelonge du artikolojn: unu por Esperanto (de nia KKS s-ro M. Stuttard) kaj alian (de D-ro G. A. Dudok, privatdocento pri moderna angla literaturo ĉe la Ūrba Universitato de Amsterdam) por la angla kiel lingvo por internacia uzado. Enketo, kombinita kun la artikoloj, rezultigis ke 94,9 procentoj de la legantoj estis por enkonduko de Esperanto kiel internacia lingvo, kaj nur 5,1 procentoj estis kontraŭ.

## Ora vesto.

En ora vesto aperis la septembra-oktobra numero de „The British Esperantist“, ĉar BEA (la Brita Esperantista Asocio) festas en la nuna jaro sian 50-jaran jubileon. Ankaŭ la Londona Klubo ekzistas 50 jarojn. La 28-paĝa ora numero enhavas poemojn de Dinwoodie kaj (bonhumoran) de Reto Rossetti, artikolojn de W. A. Gething (prez. de BEA), Hans Jakob, Teo Jung, Cecil C. Goldsmith, M. E. Langan, A. H. Middlemast, K. R. C. Sturmer kaj aliaj, ankaŭ dekludo da ilustraĵoj. Al BEA, la Londona Klubo kaj la redakcio de „The British Esperantist“ nian koran gratulon!

## D-ro Zamenhof-Esperanto-Fondaĵo.

Ĉi tiu Fondaĵo, starigita de s-ano Otto Stöber, ĉefo de la aŭstra marĉbanojo Neydharting, permesas ĉiujare al diverslandaj esperantist(in)oj senpaga 14-tagan kuracrestadon (loĝadon, manĝojn, trinkaĵojn kaj banojn) en la nomita banejo. Aŭstraj stipendiuloj ricevos ankaŭ la fervojkostojn (triaklase), eksterlandaj stipendiuloj ricevos la fervojkostojn de la aŭstra limo al Neydharting kaj revene. Krome ĉiu stipendiulo ricevos poŝmonon de 100 ŝilingoj. Petskriboj por stipendio devas esti proponataj pere de la landaj Esperanto-centroj. Detalajn informojn povas doni la Kuratoraro de la D-ro Zamenhof-Esperanto-Fondaĵo, Geistingergasse 1/6/16, Wien 19, Aŭstrio.

## Nova aŭstrá ministro-esperantisto.

Ministeria konsilanto D-ro Rudolf Fischer, membro de Aŭstria Esperantista Federacio, estas elektita ŝtata sekretario (vicministro) en la federacia ministerio por Komercio kaj Rekonstruo. Post la honora prezidanto de AEF, D-ro ing. Frenzel, do ree samideano fariĝis membro de la aŭstra registaro.

La 25.9. estis malfermita impresa Esperanto-varbekspozicio en la Viena centrojo de la turista asocio „La Naturamikoj“; parolis la estro de la Esperanto-sekcio de „La Naturamikoj“ s-ano Finkenzeller kaj la vicprezidanto de AEF D-ro Grimmé.

## Venko de dulingvismo malproksima.

Ĉe la sidejo de Unesko en Parizo estis inaŭgurita antaŭ kelkaj monatoj la kvara el la „Vojaĝontaj Sciencaj Ekspozicioj“. La titolo de tiu kvara ekspozicio estas: „La homo mezuras la mondon.“ La aranĝoj estis perfektaj; sed la vizitantoj, kiuj estis francaj, protestis tial ke la laŭparoliloj parolis la anglan lingvon. Ne estas proksima la momento, kiam la brita-franca dulingvismo ebligas al ambaŭ popoloj kompreni paroladojn faratajn en la alia lingvo.

Nun estas du britaj urboj, kiuj fratiĝas kun du francaj urboj. Ni bone komprenu: la urboj fratiĝas, sed la loĝantoj de ĉiuj urboj daŭre parolas nur sian propran lingvon. Turismo!

En Franclando estas nova modo: La urboj, kiuj situas proksime al la landlimoj, fratiĝas kun najbaraj urboj de la aliaj landoj. La francaj urboj fratiĝas kun belgiaj, germanaj aŭ italaj urboj. Ĉu iu povas sincere opini ke, en tiaj akordoj, estas loko por brita-franca lingvaĉo??

Nur Esperanto povas solvi la problemon de la internaciaj komunikoj, inter ĉiuj landoj.

G. D.

## Esperanta Asocio en Komitato de internacia Filatela Ekspozicio.

La ĉefaj filatelaj organizaĵoj de Kubo kunigis por festi la unuan centjaron de la Kuba Poŝtmarko per Internacia Filatela Ekspozicio „CUPEX '1955“, okazonta en aprilo 1955. Oni invitis la ländan asocion (Kuba Esperanto-Asocio, Apartado 1324, Habana, Cuba), por ke ĝi estu reprezentata en la Organiza Komitato. Cirkuleron en Esperanto oni eldonos tuj, kiam la O.K. aprobas plenajn detalojn pri la ekspozicio.

# HEROLDO DE ESPERANTO

## DUONMONATA INTERNACIA ORGANO DE LA ESPERANTO-MOVADO

### Prezoj:

Abono tutjara	-----	\$4.00
Abono januaro-junio	-----	2.50
Abono julio-decembro	-----	2.00
Abono subtenata	-----	8.00
Anonceto po 25 vortoj	-----	50

### Nordamerika peranto:

★ Donald E. Parrish  
328 West 46th Street  
Los Angeles 37, Calif.

## Al novaj abonantoj,

kiuj mendas abonon por 1955, ni liveros senpaga la numerojn aperantajn ankoraŭ dum la nuna jaro, ekde la momento, kiam ni ricevos la abonmendon.

# INDONEZIO, "ZONO DE SMERALDO"

De Dirk Brink



*Knabo gardante sinbanantajn karabaojn*

Malgranda knabo falas teren dum ludado. Plorante li kuras al la panjo, kiu estas en la hejmo. Panjo tuj plenigas ujon kun akvo kaj kuras al la loko, kie la filo estis falinta, kaj eljetas la akvon sur la akcidentlokon kaj hejmen reiras. Pri la vundeto ŝi ne multe zorgas. Pro kio? Ĉu ŝi estas vere tiom stranga virino? Ne, tute ne. La loko,

kie la knabo falis, estas—en orienta penso—la loko malbona sur la tero, la loko varmega; kaj per akvo-elverŝo ŝi malvarmigis la lokon kaj tion farinte ŝi estas certa, ke ne plu okazos tie akcidentoj.

Alia ekzemplo. Ie en Sumatro naskiĝis infano. Ĉiuj fenestroj kaj pordoj en la domo estas malfermitaj, ke la

malbonaj spiritoj havu la eblecon foriri. Post la naskiĝo la najbaroj kaj familianoj venas kaj ĉiu diras, ke la infano estas treege malbonaspekta, tre maldika; kaj ĉiu supozas, ke la infano ne tre longe vivos. Kaj la patrino estas tre ĝoja pri tio. Pro kio? Nu, la malbonaj spiritoj, kiuj ankaŭ aŭdas la mallaŭdojn, estas trompitaĵoj kaj ne plu





*Palmaleo en Medan, Sumatro*

ili interesigas forpreni kaj manĝi la novenaskiton. Se iu estus dirinta, ke la infano estas bonaspekta kaj sana, tio estus la plej granda insulto.

Multajn aliajn ekzemplojn oni povus doni, sed tiuj "strangaj" ekzemploj pravas, ke ni devas lerni pli pri indiĝenoj kaj pri iliaj kredoj, kutimoj kaj moroj, se ni intencas kompreni ilin kaj helpi ilin en la batalo iĝi kunuloj en ĉi tiu mondo nia.

La grupo de insuloj inter kontinenta Azio kaj Aŭstralio posedas multe da nomoj, de la poeta *Zono de Smeraldo* ĝis la oficiala *Respubliko Indonezio* (antaŭe *Nederlanda Orienta Indio*). Estas interese scii, ke la areo de tiu insularo estas same granda kiel kvarono de Usono, kaj ke la loĝantaro estas pli ol 80 milionoj, do la duono de Usono. La arkipelago enhavas pli ol 3,000 insulojn, grandegajn kaj malgrandajn, kaj pli ol 300 tute diversajn lingvojn oni tie parolas. Sed, solvon de la lingva problemo donis la komercistoj de la malaja duoninsulo, kelkajn centojn da jaroj antaŭe. Ilia lingvo estis akceptita kaj iom modifita kaj ĝi nun servas kiel la oficiala lingvo de la respubliko. La indonezia lingvo servas tie la saman celon, kion iam Esperanto servos en la tuta mondo. Apud la propra lingvo aŭ dialekto unu lingvo, kiun ĉiu komprenas.

La "Zono de Smeraldo" ankoraŭ havas alian similecon kun aliaj orientaj kaj afrikaj landoj, t. e. la malhela koloro de la haŭto kaj pro tio la respekto al blankhaŭtuloj. Tiu ĉi respekto ekzistis jam de multaj jarcentoj, kreskis en

ili, de patro al filo, tiel longe, kiel manuskripto estas malnovaj. Kaj kvankam la dua mondmilito estis la t. n. liberigimilito, post kio la brunhaŭtuloj estis liberigitaj de la blankhaŭtuloj, tamen la respekton, kiel ankaŭ la ideoj, kutimoj, k. t. p. de tuta nacio oni ja ne povas ŝanĝi en kelkaj jaroj.

En la tropikaj landoj la suno ludas plej gravan rolon en la vivo kaj ekzistado. Ĝi ja estas la unua protektanto kontraŭ malsanoj: la suno, kiu tagon post tago, jaron post jaro batalas kontraŭ la milionoj da bakterioj kaj mikroboj, kiuj endanĝerigas la homan ekzistadon. La suno estas ĉio, kion ili havas: ĝi zorgas pri kreskado de rizo, por ke ili povu rikolti dufoje en la jaro. La suno estas ankaŭ la kaŭzo, ke ili ne povas tro longe kaj tro multe labori: kutime oni ripozas de la 12-a ĝis la 2-a horo.

Indiĝenoj surhavas vestojn por protekto kontraŭ la bakanta suno, kaj por protekto kontraŭ insektoj, kiaj moskitoj, kuloj, k. t. p. Pro tio, kiam oni sin banas—tion oni ĉiam faras ekstere, kaj dufoje en la tago—ne estas kutime, ke viroj kaj virinoj apartigu; ankaŭ ne estas necese surhavi banveston—la naskiĝ-vestaĵo sufiĉas. Tamen, se grupo da geviroj baniras, la viroj ĉiam sin banas iujn dek metrojn for de la virinoj, kaj en la direkto de kiu la fluo venas. Pro kio? Pro la jarcentojn malnova kutimo, ke la viro devas protekti la virinon; kaj se iu danĝero venos, ĝi ja venos de la montoj, do de la fluo malsupren.

### *Templodio*




*Baliinoj apud templo*

Ankaŭ kiam grupo da geviroj iras kien ajn, ĉiam la viroj iras la uŭuaj, kaj poste la virinoj; iu danĝero povus veni de antaŭe. Nun, post la militoj kaj ankaŭ pro vido de multaj filmoj, precipe en la grandaj urboj oni povas vidi la virojn kaj virinojn unuj apud la aliaj, sed la plejparto ankoraŭ obeas la malnovan regulon. Ni jam diris: la kutimoj de tuta nacio ne facile ŝanĝiĝas. Tiel estas en Indonezio, la bela kaj fabela —Zono de Smeraldo.

Du tre havindaj libroj:



*Eldonita de Heroldo de Esperanto. 260 paĝoj, tuttote bindita, kun ora surpriso. \$1.65 afrankite.*




*El la ĉeĥu lingvo tradukis Tomas Pumpr. Ilustrita per 53 desegnoj de Josef Lada. Eldono de "Stafeto". 144 paĝoj, paperbindo. \$1.50, afrankite.*

Mendu de:

Esperanto League Book Service  
Middleton, Wisconsin

## E B U R A J



DE R. J. FRENCH

"KARLO Timson aranĝas loterion en la oficejo. Mi aĉetis du biletojn," anoncis Arturo al sia edzino.

"Kio estos la premio?"

"Tri elefantoj". Li ridis pro ŝia perpleksita mieno. "Eburaj elefantoj, ne pli grandaj ol ratoj."

Ŝi grimacetas. "Arĉejo, mi ne konsentis, ke nia hejmo estu, kiel tiu de viaj gepatroj, muzeo."

"Unu hirundo ne faras someron."

"Ne, sed ĝi ja estas komenco."

"Nu, eble ni ne gajnos. Ne sulkigu vian beletan vizaĝon. Du ŝancoj inter pli ol cent! La hazardo, ke ni perdos estas granda. Vi povas esperi, ke ni estos sufiĉe malbonsancaj por esti tiel bonsancaj, ke neniu elefanto ombrigos niajn feliĉajn vivojn."

Tamen ili gajnis. Arturo venis hejmen portante pakojn. La elefantoj staris rekte sur la malantaŭaj piedoj, kvazaŭ homoj, dancante en rondo kun ĉiu elegante kurba rostro alte levita.

"Kiel bele kaj vivsimile," krisis Viktorino.

"Vi ankoraŭ ne vidis la plej bonan parton." El nigra tuko Arturo prenis kristalan globon grandan kiel oranĝo kaj ekvilibrigis ĝin sur la pintoj de la tri rostroj. Tio bele kompletigis la grupon. Oni atendis, ke la globo rotaci, tiel malpeze ĝi kuŝis sur la rostroj de la blankaj bestoj, kiuj ŝajne ĝojis subtenante ĝin. Ili devis trovi lokon por sia nova akiraĵo. Forkaŝita en kelo estis multe skulptita tablo el malhela ligno. Antaŭe ili malŝatis ĝin pro ĝia emo kolekti polvon. Nun ili devis konfesi, ke ĝi taŭgas kiel subtenilo por la elefantoj. De tempo al tempo dum la vespero ili miris pro la vigla ĝoja sinteno de la bestoj, kaj konstante rimarkis novajn belecojn.

Kristala globo reflektas sian ĉirkaŭaĵon, sed estante sfera ĝi prezentas haoson en kiu oni rekonas nenium objekton krom brilaj strioj, kiuj reprezentas fenestrojn aŭ lumigilojn en la ĉambro. Tial Viktorino surpriziĝis kiam ŝi vidis en la kristalo klaran bildon de la kuirejo. "Interesa kaj bela efeto", ŝi pensis. Vespere ŝi rakontis tion al Arturo. Li provis longe, sed vidis nur la kutimajn konfuzitajn nuancojn. Lundo, bildiĝis al ŝi en la kristalo interno de magazeno. Subite unu el la servtabloj pligrandiĝis. Ruĝhara knabino mezuris, tranĉis kaj pakis flavan ŝtofon. Arturo maltrankviliĝis pri ŝia sano; evidente ŝi imagas ĉi tiujn aferojn. Jaŭdon li maltrankviliĝis plu. Ŝi diris, ke posttagmeze ŝi eliris por aĉeti kurtenojn. Servis ŝin la ruĝhara knabino, kiun ŝi jam vidis en la kristalo. "Mi estas absolute certa: kaj en la kristalo kaj en la reala magazeno, mi rimarkis kiel malakordas ŝiaj harkoloro kaj lentugoj kun la flava ŝtofo." Similaj spertoj alkutimigis ilin al la fenomenoj kaj Arturo ĉesis timi pri la sano de sia edzino.

Unu fojon ŝi diris, "Hodiaŭ mi vidis ĉi tiun ĉambron en la kristalo. Fremdulo sidis ĉe la tablo kaj parolis kun vi. Li estis grizhara tamen juna kun bluj okuloj kaj delikataj trajtoj. Liaj longaj elegantaj fingroj konstante moviĝis por helpi al li esprimi kion li preparolis."

"Tiu estas mia kuzo Gasparo. Vi ne konas lin; li estis en Usono kiam ni geedziĝis. Nu, laŭ nia sperto, se vi vidas lin en la kristalo hodiaŭ, li vizitos nin proksimume je la semajnfino." Kaj efektive Gasparo alvenis.



# ELEFANTOJ

Baldaŭ la konversacio temis pri la elefantoj. Gasparo turnis la globon inter siaj sentemaj fingroj komentante pri ĝia eksterordinara malpezeco. "Eble ja tre malmola klara gumo, certe ĝi ne povas esti vitro." Li jam vidis multajn eburajn objektojn alilande kaj opiniis la elefantojn tre malnovaj sed mirinde konservitaj. "Mi ne povas kompreni kiel vi vidis lentugojn. Rigardu la kristalon. Ĝia diametro mezuriĝas proksimume naŭ centimetrojn. Tial, en la bildo de la servtablo, la vizaĝo de la knabino ne povis okupi pli ol unu kvadratan centimetron. Laŭ tiu skalo lentugoj estus nevideblaj."

"Mi ne povas klarigi tion," respondis Viktorino, "sed certe mi kredis, ke mi vidas lentugojn. Tio, kion mi vidas en la kristalo estas tre klara, pli reala ol bildo."

"Estus tre interese, scii ĉu vi povus vidi plimalgrandajn detalojn uzante lenson. Se jes, oni inkliniĝus kredi ke la bildoj havas ian objektecon. Pri la tempo: laŭ tio, kion vi diras, afero ĉiam okazas en la kristalo tri tagojn antaŭ ol ĝi aperas en la ekstera mondo?"

"Ni ne ĉiam kontrolis tion, tamen mi kredas, ke tiel estas."

"La faktoj estas tre kuriozaj; ili ne akordas kun tio, kion mi jam legis kaj aŭdis pri tiaj aferoj."

"Surprizas min" interrompis Arturo, "ke vi traktas la temon tiel serioze. Mi ĉiam supozis, ke vi estas skeptikulo kiu mokridas okultajn aferojn."

"Mi nek kredas nek absolute neas, sciante nenion certe. Sed kvankam tiaj aferoj ŝajnas al mi neeblaj, ia atesto ke ili okazas forte interesas min. La allogo de la maleblo superas ĉion."

"Ĉu li blagas?" pensis Arturo. Li demandis, "Kial vi malkredas?"

"Pro tio, ke se oni povus vidi aŭ konstati, per kristalo aŭ per iu ajn metodo, la estontecon, tio memevidente pruvus ke la estonteco estas jam fiksita. Laŭ nia sperto kaj prudento, venontaj okazaĵoj ne estas jam fiksitaj. Ni volas, planas, entreprenas, agadas, supozante ke ni influas la estontecon; ke ni mem faras ĝin. Eble ni malpravas, eble ĉio estas eterne determinita. Tiuokaze kristalaj bildoj, kvankam interesaj, tute ne utilas kiel avertoj; oni tute ne povas eviti nek ŝanĝi tion, kio *devos* okazi."

Gasparo pruntis al ili lenson kaj konsilis, ke ili skribu notojn, kaj traktu la aferon science. Tiel ili definitive konstatis, ke inter iu kristala okazaĵo kaj ĝia duplikato en la ekstera mondo forpasis precize 72 horoj. Ĉiuj penoj profiti fiaskis; rigardante kun tia motivo en la menso, Viktorino vidis nenion. Sukceso vidi la bildojn venis ofte kiam ŝi reveme rigardis la globon pripensante aŭ farante ion alian. Post kelkaj monatoj ŝi trovis la aferon malpli plaĉa. La ĝoja sinteno de la elefantoj mokis ŝin.

\* \* \*

Policano sonorigis. Li informis Viktorinon, ke okazis trafika akcidento; ŝia edzo kuŝas en hospitalo. Al ŝia demando li respondis, "Jes, estas grave. Oni permesos al vi vidi lin je iu ajn horo."

Tuj ŝi iris kaj trovis lin senkonscia. Tiel li restis kvar tagojn. Iufoje li murmuris sensignifajn vortojn sed ne rekonis ŝin. Bonkora flegistino, kiu parolis esperige, aspektis pli kaj pli serioze. Kiam Viktorino adiaŭis la kvaran vesperon, ŝi kredis, ke ŝi vidas averton en ŝiaj kompatemaj okuloj.

Hejme estis tre malvarme. Bruliginte fajron ŝi memoris ke ŝi ne manĝis post la mateno. Ŝi endormiĝis en brakseĝo, sed baldaŭ vekigiĝis kaj dormeme rigardis la kristalon, kiu aspektis preskaŭ tute blanka kun malprecizaj makuloj. "Neĝo sur la strato," ŝi pensis; tiam subite komprenis. Tio estas blanka littuko streĉe kovranta figuron! Malklaraj konturoj sugestas la subkuŝantan kadavron. Denove ŝi aŭdis la vortojn de Gasparo, "Oni tute ne povas eviti nek ŝanĝi tion . . ."

"Ne! . . . Ne estas vere!", ŝi ekkriis. "Malbenindaj elefantoj, vi mensogas!"

Per fajrostango ŝi faris kavon inter la ardantaj karboj, enfalis la globon, kaj super tiun metis la elefantojn. Nenio rimarkinda okazis. La fajro flagris iom, la eburo kraketis kaj nigriĝis. Estis la oka kaj duono.

Matene, je la naŭa, ŝi troviĝis denove en la hospitalo. "Mi ĝojas dirante, ke via edzo komencis pliboniĝi post via foriro." "Je la oka kaj duono?"

La flegistino rigardegis. "Jes, sed kiel vi sciigiĝis? Kompreneble, eĉ nun li ne estas ekster danĝero. Mi petas, ne parolu multe al li."

Arturo, tre pala kaj ŝanceliĝema, venis hejmen post monato. Kontente li rigardis ĉirkaŭen. "Kie estas la elefantoj?"

"Ili timiĝis min." Sajne, li komprenis. Kiam li tute resaniĝis ili diskutis la aferon kun Gasparo. Tiu gratulis ilin pro la feliĉa fino. Li opiniis la metodon de Viktorino "drasta, malkonsekvenca kaj tute nelogika."



Grandformataj flagoj, kiaj en ĉi tiu bildo, estos baldaŭ haveblaj de The Esperanto League Book Service je prezo difnota. Antaŭmendojn oni akceptas nun je favora prezo de \$1. Proksimuma longeco de la flago: 3 futoj. La materialo estas verda felto. Sendu vian mendon nun al:

## THE ESPERANTO LEAGUE BOOK SERVICE

Middleton, Wisconsin

Poemoj de Omar Kajam, <i>Waringhien</i> , paper, 60 pp.	\$ .85
Historio de S.A.T., paper, 152 pages	1.30
Sennacieca Revuo, 1952-3-4, each	1.00
Aŭskultu la Voĉojn de Oceano, paper, 53 pages	.45
Kvaropo, <i>Auld, Dinwodie, Francis, Rossetti</i> , paper, 267 pages	1.50
La Arto Fariĝi Centjara, <i>Wegner</i> , paper, 59 pp.	.50
Sveda Novelaro	1.50
Interpopola Konduto, <i>Privat</i>	1.00
La Gaja Podio, <i>Schwartz</i>	1.40
Jugoslavio kaj Ĝiaj Popoloj, <i>cloth, ill.</i> , 304 pages	2.50
La Bapto de Caro Vladimir Borovskiy, 141 pages	1.50
Deveno kaj Vivo de la Lingvo Esperanto, <i>Stojan</i>	.70
La Nuna Stato de l' Evoluismo, <i>Rostant, cloth</i>	1.00
Triesto al Kiu? paper, 44 pages	.50

Write for complete listing

# NORD-AMERIKA MODERNA MUZIKO

De Elwyn C. Pollock



Kvara Movimento

*Allegro con Fuoco (Fajro)*

Oni plej bone klasifikas la stilon de tiu ĉi komponisto per la multe uzata termino "konserve moderna". Lia kredo troviĝas en la konstanta ekspansio de harmonia, melodia kaj ritma idiomoj, sed liaj novaĵoj estas firme enradikitaj en la klasiko.

Howard Hanson naskiĝis en 1896 de svedaj gepatroj en Wahoo, Nebraska. Unue instruata de la patrino, li daŭrigis la studadon ĉe Luther-Kolegio, la Universitato de Nebraska, la Instituto de Muzikarto en Novjorko, kaj poste ĉe la Kolegio de Muziko de la Nordokcidenta Universitato en Evanston, Ill. Je la aĝo de 20 jaroj, li fariĝis profesoro de teorio ĉe la Kolegio de la Pacifiko en San Jose, Cal. Je lia dudek-tria jaro oni nomis lin fakultatestro de la Konservatorio de Belartoj ĉe la sama kolegio, kaj je la dudek-kvinaliricevisla "Prix de Rome" kiu rajtigis lin al 3-jara kunfrateco en la komponado ĉe la Amerika Akademio en Romo. Kiam li revenis al Ameriko en 1924, S-ro Hanson estis nomita direktoro de la "Eastman School of Music" en Rochester, kiel ankoraŭ servas samtempe kiel administranto, instruisto, kaj direktisto.

La plej frua el la pli grandaj komponaĵoj estas la simfonio "Nordic", komponita kiam li havis nur 21 jarojn. La Orkestro Aŭgusteon en Romo ĝin unue prezentis sub la direkto de Howard Hanson mem. De tiu tempo la plej multaj el la amerikaj orkestroj jam ĝin prezentis. Ellaborita en libera klasika stilo, kaj en cikla formo, la simfonio dividiĝas en tri movimentoj. Laŭ la propraj vortoj de la komponisto la unua sekcio "kantas pri la soleneco kaj grandiozece de la nordo, ĝia senripozece kaj melankolio." La dua movimen-

to, karakterizita de sento de sopira malĝojeco, estas dediĉita "al mia patrino", kaj la tria "al mia patro", estante forta kaj fajra en spirito, esprimante la ŝaton de svedaj popolkantoj. Pro la alte melodia kaj romantika karaktero, la simfonio "Nordic" dum multaj jaroj estis la plej populara el la Hanson-komponaĵoj.

La "Romantikan Simfonion" komisiis Serge Koussevitzky por la 50a datreveno de la Bostona Simfoniorkestro, kaj la unua prezento okazis en Bostono je la 28a de novembro, 1930. Je tiu tempo Howard Hanson faris kelkajn kontraŭdirojn kiuj estis multe diskutataj. Koncernas la konflikton en moderna muziko inter romantikismo kaj realismo. Laŭ S-ro Hanson: "Tiu ĉi simfonio reprezentas por mi eskapon de la iom amara tipo de moderna muzika realismo, kiu okupas tiel grandan lokon en nuntempa pensado. Multo el la nuntempa muziko montras tendencojn fariĝi tute tro cerbece. Mi ne kredas, ke la muziko estas unue afero de la intelekto, sed male, ke ĝi estas manifesto de la emocioj. Tial mia celo en tiu ĉi simfonio estas krei muzikon junan en spirito, lirikan kaj romantikan en temperamento, simplan kaj rektan en esprimo. Mi kredas, ke troviĝas esence du tipoj de muziko: varmsanga, kiel ankaŭ malvarmsanga muziko. La "Romantika" estas definitive varmsanga muziko." La "Romantika" ankaŭ fariĝis unu el la pli bone konataj amerikaj partituroj en Eŭropo. La ĉefmelodio en la dua movimento estis uzata — ĝazforme — kiel la temo de la U.S.-Armea Dancbando je ties vojaĝo tra Eŭropo dum la milito. Brodkastis ankaŭ la popularan aranĝon la Armeo-Radio-Stacioj.

Simfonio No. 4, Opus 34, finiĝis en 1943 kaj la Bostona Simfoniorkestro ĝin prezentis la 3an de decembro, 1943, Howard Hanson direktante. La unua prezento radia aŭdiĝis la 2an de januaro, 1944, de la N.B.C.-Orkestro sub la batonode Leopold Stokowski. La latinaj subtitoloj, kiuj priskribas la kvar movimentojn, devenas el la romkatolika meso por la mortintoj: Kyrie Eleison (Sinjoro, havigu al ni kompaton), Requiescat (pace), Dies Irae (tago de pasio), Lux Aeterna (Eterna Lumo). La melankolia toneco de la Rekviema Meso provizas koloron al la tuta simfo-

nio kaj, laŭ Serge Koussevitzky, "unu el la plej noblaj komponaĵoj iam verkita en Ameriko." Alte persona kaj emocia esprimo, ĝi estas konciza kaj alte eliziigita: necesas apenaŭ 20 minutoj por ĝin prezenti. La kvar movimentoj mallonge karakteriziĝas jene: La unua estas tumulta kaj diversa. Aŭdiĝas "Kyrie"-subjekto kun alterne danc-kaj kant-similaj sekcioj, kaj tiam horala dirajo, antaŭ ŝtorma finiĝo. La dua: simpla kaj dolĉa traktado de skalsimila temo en okono-notoj, ludata de solo-fagoto. La tria: furioza kaj amara skerco. La lasta: pastoralo kun ŝtormaj intermetoj. Ĝi havas simplan 2-4 finaĵon, estingigante surdua inverto de majora triado. (Formale oni povas diri, ke la verko estas ekstreme komplikata, preme kunbindita.) Post la Novjorka prezento, Olin Downes priskribis: "Tiu ĉi simfonio, niaopinie, estas la plej bona en la formo, kiun Howard Hanson prezentas al sia publiko."

La celo estas forte emocia, ne nur elegia kaj mistika. Troviĝas kontrasto kaj dramo en la partituro. La simfonio estas kompakta, vireca en stilo, kun larĝaj linioj kaj libera arkitekturo. Rememorante ĝin post kelkaj aŭdoj, la unua movimento estas la plej etendita kaj ellaborita en la evoluo, kvankam neniu ĝia parto estas longa. La movimento "Dies Irae" estas malpli alvoko ol kio ŝajnas esti duongroteska aŭ ironia sugestio de mortodanco, kiun oni eble vidus en iu fantazia fresko de mezaĝulisto de la peniko! La lumeco de la instrumentado ĉe la finiĝo estas toneca enkorpiĝo de la subtitolo, kvankam tragedia interludo apartigas la brilan malfermon de la solena finiĝo.

La kontribuo de ĉi tiu distinge influa figuro en amerika muziko ne kuŝas en iu sola komponaĵo, nek en iu sola fazo de lia aktiveco. Se li havas propran artistan kredon, ĝi troviĝas en la neceso por absoluta libereco de kreema esprimo: ĉiu komponisto verkante el la profundo de la propra animo tion, kio ŝajnas al li esti bona. Kiam tia kredo estos ĝenerale tenata de komponistoj, kritikoj, kaj muzikamantoj, tiam akademiasaj demandoj pri gradoj de noveco cedos al la pli esencaj problemoj, provante ĉiun novan verkon per la kara metalo de esenca beleco, sen kio neniu verko povas vivi!

## NIAJ MEMBROJ

Dirk Brink, kiu verkis por ni la artikolon pri Indonezio (vidu sur paĝo 6), tre bone scias, pri kio li skribas. Naskiĝinte en Batavia, ĉefurbo de la tiam Nederlanda Orient-Indio, li vivis la plejparton de siaj 31 jaroj sur la insulo; de la "Zono de Smeraldo". Lia patro estis lernejestro, sendita tien — kaj la tuta familio kun li — de la nederlanda registaro. Translokigoj okazis ofte kaj, pro tio, S-ano Brink estis en preskaŭ ĉiu grandinsulo de Sabang ĝis Meraŭke.

En 1941, kiam milito venis al la Pacifikaj insularoj, S-ano Brink aniĝis en la nederlandan aerforton en Indonezio. Por la malmultaj (entute nur 100,000) soldatoj de Indio, la milito daŭris nur tri monatojn, kaj tiam oni devis kaptlacii al la japanoj.

Kvankam la longaj jaroj kiel militkaptito estis jaroj de sufero kaj humiliĝo S-ano Brink memoras, ke li renkontis du japanajn oficirojn, kiuj estis Esperantistoj; kaj ke ili traktis lin "kiel veraj Esperantistoj".

Dum la unua jaro de militkaptiteco, S-ano Brink restis en Malang, Orienta Javo, kie li konatiĝis kun S-ro Johan Lucas, fervora Esperantisto, kiu baldaŭ fondis klason en kiu S-ano Brink estis ano. "De tiu tempo," li diras, "mi ne de laboras por Esperanto." Parenteze, S-ano Brink scipovas entute naŭ lingvojn, inkluzive la japanan, kiun li lernis kaŝe dum la kaptiteco.

Post tiu jaro en Javo, la japanoj sendis lin al Siamo, kie li devis labori sur la malbonfama "mortfervojo" al Burmo; ĝi kostis 100,000 vivojn antaŭ ol ĝi estis finkonstruita. Poste li laboris en karbminejo en Kiusju, Japanujo. Interesafakto estas, ke oni malpermesis al la kaptitoj kreskigi harojn sur la kapoj, por ke oni povu rekonii ilin kiel militkaptitojn; plue, oni fotografis ilin

kaj publikigis la fotografaĵojn en la ĵurnaloj por keeĉ ĉiu civilulo ilin rekonu. Tiu fotografaĵo estas nun memoraĵo pri tiuj tempoj. Jen ĝi:



Post la milito S-ano Brink rekuniĝis kun sia familio, kaj ili ĉiuj iris al Aŭstralio, kie la liberigito malrapide reakiris la sanon. Tiam, post mallonga restado en Nederlando, li reiris alla amata Indio. En Javo li renkontis D-ron Franz Grunneck, aŭstron, kies nevinon S-ano Brink poste edzinigis.

Politikaj maltrankviloj finfine decidigis la familion Brink forlasi Indonezion, kaj en 1951 li, la edzino, kaj unujara filino iris dum iom da tempo al Eŭropo, poste venis al Usono, kie ili loĝis unue en Chicago kaj tiam en Los Angeles.

S-ano Brink antaŭ mallonge elektigis kasisto de la Esperanto-Klubo de Los Angeles, kaj fariĝis aktiva ankaŭ en nia Ligo. Al Dirk kaj Inge Brink, kaj al filino Linda, ni deziras ĉian bonon kaj prosperon; kaj ni estas certaj, ke per iliaj laboroj prosperos ankaŭ Esperanto en Norda Ameriko.

la greka imperiestro Basileo II-a el Konstantinoplo. Tamen, estiĝis multaj legendoj pri la konvertiĝo de la unua Kristana caro, kaj la ĉeĥa ĵurnalisto Havlicek uzis unu tian legendon kiel bazon por lia poemo, kiu estas pikanta kritiko pri diversaj sociaj kaj politikaj malbonoj de sia tempo. Efektive, la poemo satiras ne nur pri kondiĉoj en tiam Bohemio, projektataj kontraŭ fono de legenda Ruslando, sed pri misordoj multaspecaj, konstatablaj en ĉiu tempo, ne escepte la nian.


Nu, lau la rakonto de Havlicek, Caro Vladimir, okaze de sia naskiĝtaga festo, planas ŝtatan bankedon kaj ordonas al la dio Perun signi la tagon per tondrado. La dio rifuzas, kaj profitas l' okazon por plendi pri la multa laboro kaj malalta salajro de sia profesio. La Caro arestigas la dion, aperigas lin antaŭ tribunalo, kiu kondannas lin je morto por malbeo. Ruslando do fariĝas sendia, kaj baldaŭ la eklezio ekkonstatas, ke ĝi perdis sian influon, precipe ĉe la kamparanoj. La pagana hierarkio do klopodas konvinki la caron elekti novan dion por anstataŭi la mortintan Perun. Oni anoncas en la gravaj ĵurnaloj de la mondo, ke okazos "konkurso" por pleniĝi la vakan postenon. Alkuras reprezentantoj de ĉiuj eklezioj de la mondo, ĉiu laŭdante sian propran religion.

La rakonto restas bedaŭrinde nefinita, ĉar mortis la persekutata Havlicek pro tuberkulozo, akirita dum politika mallibero. Malgraŭ tio, oni ne povas dubi pri la intencita fino de la rakonto: la caro devas finfine konvinkiĝi favore al la grekortodoksa Kristanismo kaj en ĝi baptiĝi.

"La nekompletecon de la verko", oni pretendas en ĝia epilogo, "la leganto apenaŭ rimarkas"; tamen tio ne estas entute vera — precipe, se oni ne estas antaŭe avertita pri ĝi. Aliflanke oni devas konstati, ke la nekompleteco ne malhelpis, ke *La Bapto de Caro Vladimir* estu konsiderata kiel ĉefverko de la ĉeĥa lingvo, kaj oni konstatas ankaŭ, ke ĝi estas unu el la plej brile sukcesaj tradukoj ĝis nun en la Esperanta. Ĝi plenas je trafaj esprimoj, lertaj rimoj kaj geniaj konstruoj kiaj distingas la unuarangajn poetojn de la nuna literatura periodo de nia lingvo. Kompletaj, detalaj notoj klarigas pri tiuj punktoj, kiuj povus esti iom obskuraj al neslavoj.

La tekston akompanas 53 spritaj ilustraĵoj faritaj de la fama ĉeĥa desegnisto Josef Lada. La papero estas bonekvalita kaj la presotekniko bona.

La libro estas nepre rekomendinda al kiu ajn Esperantisto.



La Bapto de Caro Vladimir, de Karel Havlicek Borovskij, Esperantigita de Tomas Pumpr. Eldono de "Stafeto". Paperbando, 141 paĝoj. Havebla ĉe The Esperanto League Book Service, Middleton, Wis. \$1.50.

Laŭ la rusa historio, estis la Caro Vladimir kiu, en la jaro 988, akceptis la Kristanan kredon kaj poste kaŭzis ĝian disvastigon en Ruslando. La kronikoj indikas, ke tiu konvertiĝo rezultis kiam Vladimir edzinigis fratino de

(Continued from page 1)

speaking the language. As a result, I belong to those who sympathize; and in international relations where the Dutch language is not sufficient I make use of one of the foreign languages which I learned in my youth. Thus I recognize all the more how difficult it is for the leaders in international life, who have mastered the language of one or more of the great countries, to accept Esperanto as the international language. For this reason Esperanto can only win little by little the place which it deserves and which will, with time, greatly facilitate international traffic.

However, Esperanto was not designed for such purposes alone, nor is the language of use only for this kind of international convention. There is also the matter of relations between ordinary men and women of different nations, aside from international congresses. It strikes me that Esperanto has already achieved much in that regard, and that the users of Esperanto, including members of the working classes—perhaps with a talent for languages, yet without knowledge of foreign languages—have been able by means of Esperanto to make contacts throughout the world.

In spite of some opposition, which is to be expected, and although the successes won by Esperanto are still smaller than one would hope, much has been accomplished.

In this way, the international language has already been of service in the tiring and often apparently vain effort to bring about a better understanding among the peoples of the world—that high purpose, which was ever present in the mind of your great



**Esperanto  
and Stamps**  
by *Conrad Fisher*  
RFD1, Meadville, Pa.

I was mentioned in *Stamps*, the weekly magazine, August 28. As a result, fourteen inquiries came. One was written *entirely in Esperanto*, and started with the statement that the writer had been away from the movement for nearly *forty* (Yes! 40!) years and wanted to resume activity. Another, in English, ended "kun plej amikaj salutoj", and started: "Many years ago the writer was very much interested in Esperanto. In fact, I learned to read quite well and also to write and even to speak some. Much has happened in the world since then but I still remember the grammar and could read enough to enjoy it."

International Club to Collect  
Esperantiana (EKIK)

Are you interested in such Esperanto items (Esperantiana) as *glumarkoj* (poster stamps or stickers in or about Esperanto), Esperanto-*ŝtampoj* (cancellations in or about Esperanto), pictures of streets and other places with names in Esperanto or referring to some outstanding Esperanto personality, periodicals in or about Esperanto?

If you are, you should join EKIK, Esperantaĵojn Kolektanta Internacia Klubo. There are no dues. Membership is open to all interested. The leader of the Klubo is Louis Obreczian, 213½ Sixth St., Windber, Pa. Mention my name, please.

If you already have a small collection of *glumarkoj* or *ŝtampoj*, list them in your letter to Mr. Obreczian. Don't forget to use commemorative stamps on your letter to him.

pioneer Dr. Zamenhof, as he brought Esperanto into being.

It is my earnest desire for you that this Congress, by the example of

## SALUTKARTOJ POR KRISTNASKO



*Mendu true! Sendu true!*

Jen via oportuno akiri kvanton da plej altkvalitaj salutkartoj por Kristnasko kaj Nova Jaro, kun tekstoj en Esperanto. Aĉeteblaj po dek kartoj de unu speco por 50 cendoj, inkluzive kovertojn. Minimuma mendo, dek kartoj. Aldonu \$1 al via mendo se vi deziras surprizon de via nomo.

Nepre indiku la specon de la dezirat-aj kartoj, citante la identigan literon sur la ilustraĵo supre.

*Mendu de:*

SEATTLE ESPERANTO PRESS  
2116 N. 35th Street, Seattle 3, Wash.

mutual understanding, in the literal as well as the figurative sense, which it will certainly give, will be a new step in that direction.

*North American Esperanto Review*  
6205 South Prospect  
Tacoma, Wash.

Return Postage Guaranteed

Form 3547 requested

